


Bulgaria ESPERANTISTO





ENHAVO

- * * * „Ne!“ a la bumerango 1
Jordan Ĉaljovski. 30-jara jubileo de 2
N. Ĉarčarov, G. Mihajkov. Pli kaj 3
 E-kunvenoj 4
Cv. Todorov. Forta amikeco 4
Nikola Rašev. Esperanto servis 4
 ligilo kun Sovetunio 4
Semjon Komisarenko. La unua ren- 5
 devuo 5
Dimo Todorov. Penjo verkis ankaŭ en 7
 Esperanto 7
Stančo R. Drebov. Penjo mem nomis 8
 sin internaciisto-esperantisto 8
Vladimir T. Georgiev. Ni gardu la 9
 pacon. Tradukis Rosica Georgieva 9
Vasja Petrova. Ĉe la germanaj gea- 9
 mikoj 9
 * * * Per Esperanto tra Ĉeĥoslovakio 10
 kaj Pollando 10
Mitko Nenkov. Esperantistoj el Svištov 10
 en GDR 10
Jean Marin. Esperanto en komuna la- 11
 boro de pedagogoj 11
Sergej Krajinov. Mallonge pri mia vi- 12
 zito en Bulgario 12
Zoja Skvorcova. Fragmento el letero 13
Vasja Petrova. Intervjuo kun d-ro Ma- 13
 gomet Isaev 13
Vanja Filipova. Kiam la negeroj flu- 14
 stras 14
Ljudmila Jevsejeva. Heroino Rita 16
 Mi ne gripas 16
 Distroj. Enigmo. Tra la gazdaro
 Deziras korespondi

Sur la kovrilpago

En Somera Sender-Lernejo apud la Nigra Maro. Junpianinoj el la ĉiadan-
 kaj el Hungario kun siaj gvidantoj.

Tra la poloj. Unu grupo da espe-
 rantistoj el Svištov en GDR, ĉefa pa-
 ĝo de la Esperanto-muzeo

la slovena Esperanto-muzeo (vd. pa-
 ĝo 10).

La 1-a Eksterlanda Konferenco de la Esperanto-GDR (vd. pa-
 ĝo 9).

Redakta Komitato

Kunčo VALEV (ĉefredaktoro), Nevenka
 ALEKSIEVA, Ljuba BOJAGIEVA, Di-
 mitro DENCEV, Ĥristo GOROV, Asen
 GRIGOROV, Dimitro HAĜIEV, Krâ-
 stju KARUCIN, Haim LEVI, Vasja
 RETROVA.

Korektis Vasja Petrova

Sofio, p. k. 66

Tel. 31-00-29

**„NE!“ AL LA BUMERANGO**

De prahistoriaj tempoj la homaro revas pri eterna paco. Ankaŭ nia majstro Zamenhof sopiris la intergentan kaj interpopolan pacon. Esperanto, lia mirinda kreaĵo, celas interkomprenon kaj pacon. Per sia fama „Letero al la diplomatoj“ Zamenhof penis malebligi la eksplodon de la unua mondmilito. Tamen la ŝovinistoj kaj militaristoj tiam subpremis la pacvolon de la popolamasoj kaj pelis ilin al reciproka buĉado sur la frontoj. El la sango de la mortigitoj kaj kripligitoj ŝprucis oraj fontanoj kaj plenŝtopis la kasojn de la armilfabrikistoj.

La salvo de „Aŭroro“ kaj la dekreto de Lenin pri monda paco vekis helajn esperojn. Sed la paco daŭris nelonge. La germana imperiismo kaj la itala faŝismo denove eksvingis la torĉon de agresa milito. En la kaŭzita de ili dua mondmilito pereis dekoj da milionoj. Nur la soveta popolo perdis dudek milionojn da civitanoj. Felice tamen, sur la ruinoj de orienta kaj meza Eŭropo naskiĝis novaj ŝtatoj — sen militaristoj kaj ŝovinistoj, sen ekspluatistoj. Ili malakceptas la militon kiel „daŭrigon de la diplomatio“, ilia plej grava tasko estas la bonstato kaj la sekureco de iliaj popoloj kaj landoj. Kreiĝis premioj por paca kunekzistado de ŝtatoj kun malsama sociordo kaj ideologio. Iam la militpreparantoj sidis en siaj citadeloj kaj nur profitis el la militoj. Nun la raketa kaj nuklea bataliloj similas al la bumerango de la aŭstraliaj indiĝenoj: ĝi reflugas al tiu, kiu ĝin ĵetis!

Jen pro kio jam multaj prudentaj politikistoj en la kapitalisma mondo atentis la pacproponojn de Moskvo kaj de la ceteraj socialismaj landoj. Krom ili la tuta pacama homaro subtenas ilin. La ĉi-jara asembleo de UNO per granda plimulto de la voĉoj akceptis por la venontjara tagordo traktadon de la soveta propono pri universala kontrakto kontraŭ uzo de militforto en la interŝtataj rilatoj. Se ĉiuj ŝtatoj subskribos la kontrakton, tio estos grava paŝo al efektiviĝo de la miljara revo pri mondo sen militoj. Tiam la internaciaj pacaj rilatoj multe pli favoros la disvastigon kaj ĝeneralan uzon de Esperanto.

La reakciaj rondoj en Okcidento kontraŭstaras la paciniciatojn de la socialismaj landoj. Per disvastigo de kalumnioj kaj malveroj ili penas revenigi la malvarman militon, semi malamon kontraŭ la komunisma movado, kontraŭ la naciliberiga movado kaj la monda pacmovado. Kvankam la NATO-generaloj kaj la fabrikistoj de armiloj febre preparas novan militon, kio akre kontraŭdiras la decidojn de la Tuteŭropa Konferenco en Helsinki, la popoloj restas optimismaj. La fortoj, kiuj laboras por la paco, estas multe pli potencaj ol la fortoj de la agresa milito kaj ili ne permesos al la bumerango neniigi la vivon sur nia planedo.

La bulgaraj esperantistoj plene aprobas la paŝojn de sia popola registaro, kiu en la spirito de Helsinki konstruas siajn rilatojn kun nesocialismaj landoj sur la principoj de paca kunekzistado, de reciproka kaj egalrajta kunlaboro sur kampo politika, ekonomia kaj kultura.



Apartan atenton nia lando donas al siaj rilatoj kun la nesocialismaj ŝtatoj sur la Balkana Duoninsulo. Sincera amiko de la internacia amikeco kaj interŝtata kunlaboro, ĝi konsekvence plibonigas tiujn rilatojn, por ke la Balkanoj ne plu estu „pomo de kverelo“.

En la historion eniris ankoraŭ unu jaro — la 76-a. Ĝi estis fruktodona por la pacfortoj. Por la landoj de la kapitalo ĝi estis malfavora — tie furiozas inflacio kaj senlaboreco.

Forpasis la 76-a, sed la batalo por paco daŭras: „Ne!“ al la bumerango!

ORGANIZA VIVO

30-JARA JUBILEO DE BEK

La 22-a de oktobro 1975, kulturdomo „Emil Ŝekerĝijski“. Ĉe la enirejo de la salono la prezidanto kaj oficistoj de Bulgara Esperantista Kooperativo bonvenigas gastojn kaj enmanigas jubilean insignon kaj bultenon pri la agado de la Kooperativo. La granda salono estas feste ornamita. Senĉese ludas belsona muziko, kiu subtenas la bonan humoron de la ĉeestantaro. La nacia trikoloro, la kooperativa kaj la esperantista standardoj pendas en la fono de la scenejo. Ĉeestas multaj esperantistoj-kunfondintoj de BEK, inter ili Minko Conkovski — la unua prezidanto, Evstati Cifudov — la plej longe funkciinta kaj nun honora prezidanto, la nuna prezidanto Ivan Ivanov kaj multaj longjaraj estraranoj kiel Ivan Kovaĉev, Stojan Kostadinov, Georgi Dolapĉiev, Marin Petkov ka.

La kunvenon malkovris Boris Popov, estrarano de BEK. Sur la podio aperis reprezentantoj de diversaj organizaĵoj: vicprezidantoj de la Centra kaj Urba Komitatoj de la Kooperativa Unuiĝo, la prezidantoj de BEA kaj MEM, de diversaj kooperativoj, eksaj kaj nunaj estraranoj de BEK ka.

Pri la historio kaj agado de BEK raportis ĝia prezidanto Ivanov. Li notis, ke fervoraj esperantistoj kiel Dimitro Simeonov, Atanas D. Atanasov, Stefan Minkov ka. faris la unuajn provojn fondi E-kooperativon en nia lando. La provo en 1911 estis tamen senrezulta. Apenaŭ en 1923 oni sukcesis. Bedaŭrinde, la fondita kooperativo ekzistis nur du

jarojn. En 1927 oni denove faris sensukcesan provon. La tiama monarko-fasisma ŝtato ne nur ne helpis, sed ĉiam krude sufokis la progreseman E-movadon, persekutis la plej aktivajn esperantistojn. Apenaŭ post la 9-a de septembro 1944, kiam la popola ŝtato komencis ĉiuflanke helpi la kooperativan movadon, estis fondita la nuna BEK. Ĝi jam havas 1400 membrojn (ĉe la fondiĝo nur 100). Komence ĝi estis nur komerca, sed poste fariĝis ankaŭ produkta organizaĵo. Tri jardekojn ĝiaj 13 librovendejoj servas al la esperantistaro en nia lando. Ili liveras E-lernolibrojn, vortarojn, E-literaturon — naciajn kaj eksterlandan, diversajn esperantaĵojn. Dektri verdaj ŝildoj-lumturoj kaj vitrinoj altiras la rigardon de la preterpasantoj kaj propagandas Esperanton. 30 jarojn BEK plenumas sukcese siajn planojn kaj tiamaniere laŭ siaj fortoj kontribuas por plenumo de la ŝtataj ekonomiaj planoj.

La plej alta organo de nia Respubliko — la Ŝtata Soveto — per speciala dekreto honoris BEK per Ordeno de la Laboro — ora, okaze de ĝia 30-jara jubileo kaj pro la atingitaj de ĝi grandaj laborsukcesoj.

Salutparoladojn ĉe la celebrego faris la prezidanto de BEA Ĥristo Gorov, la reprezentanto de la Kooperativa Unuiĝo ka.

Riĉan belartan programon plenumis aktoroj el la sofiaj teatroj.

Vespere la saman tagon en restoracio „Balkan“ BEK aranĝis bankedon por sia tuta personaro kaj gastoj.

J. Ĉaljovski

ESPERANTISTOJ-ŜAKLUDANTOJ, AKTIVIGU!

La Esperanta Ŝaka Ligo Internacia (EŜLI) intencas organizi ŝakfestivalon enkadre de la 63-a Universala Kongreso de Esperanto en Varna (1978). Tiam ĝi celebros ankaŭ sian 20-jariĝon.

EŜLI ĉiujare aranĝas ŝakfestivalojn en diversaj landoj, ankaŭ ŝakturnirojn, kiel: La Monda Pokalo de la esperantistoj; laŭtemaj turniroj; turniroj de kolektantoj de bildkartoj — la partoprenantoj sendas monon nur pere de bildkartoj; aliaj turniroj laŭ proponoj de siaj membroj.

Esperantistoj-ŝakŝatantoj, por ricevi pliajn detalojn adresu vin al la peranto de EŜLI por nia lando: Ivan Vojnov, Bjalo More 8, MA-2, 1527 Sofio.



Pazarĝik. Publika kunveno estis organizita dediĉe al la 90-jariĝo de Esperanto kaj la 70-jariĝo de BEA. Ĝi okazis en la granda salono de la Distrikta Junulara Domo. Venis multnombra neesperantista publiko, kion oni ŝuldas al la komuna agitado de E-societo „Radio“ kaj la urbaj komitatoj de Patrolanda Fronto, Komsomolo kaj la Junulara Domo.

Antaŭ la kunveno bulgarlingve parolis pri Esperanto kaj la E-movado prof. Stojan Ĝuĝev, membro de la Akademio de Esperanto. La kunveno havis tre bonan sukceson.

N. Cărcărov

Pernik. Granda publika kunveno okazis ankaŭ en Pernik, en la Sindikata Kulturdomo de la Ministo. Ĝi estis organizita de la loka E-societo, la Komisiono pri Laboro inter la Virinoj kaj la Domo de la Ministo en Pernik. Ĉeestis ĉirkaŭ 200 personoj, plejparte neesperantistoj, ankaŭ 10 gastoj-esperantistoj el Sofio. Bulgarlingve pri Esperanto kiel brila solvo de la problemoj pri internacia lingvo parolis Kunčo Vălev — sekretario de BEA, ĉefredaktoro de „Bulgara Esperantisto“ kaj direktoro de Esperanto en la Sofia Universi-

tato. Fine de sia riĉa kaj kaptanta parolado li alvokis la ĉeestantojn lerni Esperanton.

Post la prelego sekvis rava belarta programo, miksitaj — en Esperanto kaj en bulgara, kiun plenumis la soĥianoj. Vera Văjarova bonege recitis E-versaĵojn de Asen Grigorov kaj Stojan Kostaĥinov. Siajn E-verkojn legis Ljuba Bojaĝieva kaj Georgi Miĥalkov. La estrada E-kantisto Mišo Zăvev, akompanata per gitaro de L. Bojaĝieva, plenumis emocie kvar kantojn en Esperanto kaj unu en bulgara. La artisto de la Bulgara E-Teatro Miĥail Ĉobanov recitis majstre en bulgara lingvo du popolajn kantojn kaj humuraĵon. La programon gvidis Pera Georgieva. Ĝi estis konvinka, belarta ilustraĵo de la parolado.

Similajn propagandajn kunvenojn oni devas pli ofte kaj ĉie organizi — ili venigas novajn homojn al la E-movado. Sed oni ne forgesu: organizantoj devas esti la esperantistoj kompanie kun aliaj sociaj kaj kulturaj organizaĵoj en la loĝloko (Patrolanda Fronto, Komsomolo, Sindikatoj, turistaj societoj, komitatoj de sobereco, packomitatoj, kulturdomoj, legejoj ka.). Tio garantias sukceson.

G. Miĥalkov

LA ESPERANTO-DOMO EN GABAREVO

Antaŭ kelkaj jaroj „Bulgara Esperantisto“ informis, ke la maljuna sindona esperantistino Anastasija Baklarova el vilaĝo Gabarevo (distrikto Stara Zagora) donacis sian domon kaj sumon de 2000 levoj al la E-societo en la vilaĝo. Sia deziro estis, ke per tiu ĉi mono oni aranĝu tie E-domon.

Gabarevo situas proksime de u. Kazanlâk, de v. Šipka kaj la montopintoj Stoletoŭ kaj Buzluĝa, pro tio ĝi estas interesa kiel elirpunkto al tiuj ĉi kaj aliaj turismaj objektoj.

Delonge la esperantistoj de Plovdiv deziris konatiĝi kun la esperantistoj de Gabarevo kaj viziti la E-domon. La 16—17-an de oktobro la turista sekcio de la Distrikta Estraro de BEA en Plovdiv organizis ekskurson al Kazanlâk kaj la partoprenantoj tranoktis en Gabarevo.

Ĉe la fervojstacio nin renkontis la loka instruisto-esperantisto Reĝeb Zurjabov. Per sia aŭtomobilo li veturigis al la vilaĝo la pli aĝajn el la grupo. Ni konatiĝis kun la vilaĝestro, energia kaj iniciatema homo, kiu tre bone rilatas al la E-societo en la vilaĝo, ĉiam helpis kaj promesas plu helpi por la sukcesa finpretigo de la E-domo. La konstruaĵo mem estas masiva. En ĝi estas tri ĉambroj kun entute 12 litoj, kaj ĉiam esperantistoj povas tranokti tie kontraŭ minimuma pago. Krom tio en la vilaĝo estas hotelo kun 13 litoj, do 25-persona grupo trankvile povus pasigi la

nokton en la vilaĝo, se oni anticipe avertos la vilaĝestron. Se la grupo nombrus pli da homoj, parto de ĝi povus esti loĝigita en privataj domoj.

La subtegmenta ejo de la domo post plibonigaj laboroj povus esti aranĝita kiel turista dormejo. Tiam la E-movado en nia lando havos ĉi tie bonegan bazon kun pli ol 30 litoj, kiun oni povus utiligi por ripozo, kursoj, seminarioj ka.

En la korto de la domo estas konstruita nova ejo kun 30 sidlokoj. Ĝi povus bonege servi kiel kursejo.

Mi opinias, ke ankaŭ la Centra Estraro de BEA devas helpi por la plena rekonstruo kaj rearanĝo de tiu ĉi nura E-bazo en la belega Roza Valo.

En la E-domo ni trafis la konatan E-veteranon Simeon Ĥesapĉiev, kiu tre varme subtenis la iniciaton pri starigo de E-bazo en la vilaĝo. Krom li tie estis ankaŭ la E-veterano Anton Genov el Nova Zagora. Inter ili kaj k-dino Anka Praĥova el Plovdiv okazis ĝoja amika renkontiĝo, ĉar ili delonge ne vidis unu la alian.

La sekvan tagon nia grupo forveturis al Kazanlâk, kie nin renkontis la aktivulo de la E-movado en v. Šipka — Ĥristo Kurumilev, loĝanta en Kazanlâk. Ni vizitis la muzeon kaj la tracan tombejon.

Miĥail Danĉev

Varna kaj sincera amikeco ligas la esperantistojn de Ŝumen kun la esperantistoj de GDR. Kolektiva korespondado estas starigita kun la E-societoj en Drezden kaj Ŝverin (Schwerin). Multnombraj estas la personaj kontaktoj kun amikoj de Roŝtok, Berlin, Lajpcig, Potzdam ka. Lige kun ĉiu germana kaj bulgara festoj estas interŝanĝataj salutleteroj. Vigla kontakto ekzistas kun la ĝemela urbo Magdeburg. Oni organizas kunvenojn, publikigas materialojn en la lokaj ĵurnaloj kaj tiamaniere konigas al la civitanoj de ambaŭ urboj la konstruadon de nova vivo. Amikoj de Ŝumen kaj Magdeburg ofte gastas uru al la alia.

La 4-an de oktobro en la klubejo de „Ve-kiĝo“ estis organizita „ĵurnalo parolata“, dediĉita al la 27-a jariĝo de GDR. La multjara socianto kaj esperantisto Atanas Bojaĝiev voĉlegis la „ĉefartikolon“, per kiu li konigis al la ĉeestantoj la grandajn sukcesojn atingitajn en la unua ŝtato de la germanaj laboristoj kaj vilaĝanoj. Cvjatko Stojanov rakontis pri interesaj momentoj el sia korespondado kun germanaj amikoj kaj priskribis siajn im-

presojn de Magdeburg. Ing. Georgiev kaj Vasil Georgiev partoprenis en la „paĝo“, dediĉita al la kulturaj atingajoj de GDR, tra- legante materialojn el „Der Esperantist“. La „paĝoj“ de la ĵurnalo parolata estis fermitaj post aprobo de salutletero al la konsulejo de GDR en u. Varna.

La ĵurnalo parolata estas tre konvena, akti- viga formo de kluba laboro, rekomendinda por ĉiuj E-societoj.

Cv. Todorov

E-RENKONTIĜO EN KÂRGALI

Fine de oktobro la esperantistoj de Kârĝali havis karan gaston — k-do Nikola Aleksi-v, prezidanto de MEM kaj de DKK de la 63-a UK de Esperanto en Varna. Ĉeestis k-do Ĥaĝiminev — prezidanto de la loka E-societo „Stelo“, la E-veterano Simeon Petrov, Kere- lezov, Mustafov, Kostov ka.

Ĉefa temo estis la aktivigo de la esperan- tista vivo en Kârĝali kaj ties distrikto lige kun la antaŭstaranta UK en Varna.

La renkontiĝo kun k-do Alekseiv estas im- pulso por ni al nova, vigla E-agado.

Nijazi Hjuseinov



ESPERANTO SERVIS KIEL LIGILO KUN SOVETUNIO

La bulgaraj komunistoj kaj antifaŝistoj batalis kontraŭ la kapitalismo kaj faŝismo ne nur ĉe ni, sed ankaŭ en fremdaj landoj — kune kun la popoloj de tiuj landoj. Tio ĉi estas esprimo de la internaciismo de nia popolo. Multaj el tiuj liberamaj homoj pereis he- roe en la batalo kaj per sia sango cementis la amikecon de la bulgara popolo kun aliaj popoloj.

Unu el la landoj, kie la bulgaraj komunistoj kaj kontraŭfaŝistoj batalis, estas la frata Ĉeĥoslovakio. En ĝi la bulgaroj trafadis ĉiam plej bonan akcepton. Ili venis ĉi tien por la- bori kaj studi. Inter ili estis ankaŭ esperantistoj. Pri la batalo de la bulgaroj kontraŭ la kapitalismo kaj faŝismo en tiu lando rakontas la libro „En batalo sur frata tero“ — kolekto de rememoroj de partoprenintoj en tiu ĉi batalo. Ĉi-sube ni publikigas la rememorojn de la esperantisto ing. NIKOLA RAŜEV sub la titolo „Esperanto servis al ni kiel ligilo kun USSR“

Por mi, kiel esperantisto, dum mia studado en urbo Brno malkovrigis novaj horizontoj por laboro. Mi komprenis, ke Esperanto estas bonega, treege efika rimedo por klarigi la ve- ron pri USSR. Tiam la burĝaro utiligadis ĉiujn eblajn rimedojn — radion, lernejojn, preĝejojn ka. — por blasfemi kaj nigrigi la unuan ŝtaton de laboristoj kaj kamparanoj en la mondo. Instigita kaj helpata de la aktivularo de societo „Levski“ en Brno, kune kun kelkaj esperantistoj — Ivan Pizarov, Stojan Nihtjanov ka. — ni komencis kores-

pondadon kun esperantistoj el USSR. Poste tiuj ĉi ligoj plivigliĝis, precipe kun la stu- dentoj Maksimov — el la Leningrada Elektro- teknika Instituto, Viktor Gruŝko kaj Kostin el Rostov ĉe Dono ka. Ni ricevadis multe da ĵurnaloj, ilustritaj revuoj kaj leteroj, kelkajn el kiuj ni utiligadis por la murgazeto, elek- nata en la studenta kooperativa manĝejo. Tu- taj numeroj de la murgazeto estis plenokupa- taj de tiuj informoj, kiujn la studentoj legis kun granda intereso. Ni ricevadis ankaŭ nu- merojn de sovetaj studentaj ĵurnaloj kaj re-

* „V borba na bratska zemja“, Partizdat, Sofia, 1976 j., 474 paĝoj.



Semjon Komisarenko

LA UNUA RENDEVUO

La rendevuo devis okazi je la sepa. Sed Jurij Petroviĉ decidis alveni iom pli frue. Se ankaŭ ŝi venos pli frue?...

La tempo hodiaŭ, precipe posttagmeze, kvazaŭ haltis. Jurij Petroviĉ sukcesis reveni hejmen, petinte permeson de sia estro pli frue eliri el la laborejo pro la unua rendevuo. Li alivestigis kaj pli-malpli trankviligis, poste ekrondiris sub la granda horloĝo en la aleo de amantoj en la urba parko. Sed ĝis la sepa la tempo ankoraŭ multis.

Finfine Jurij Petroviĉ decidis ne flankeniĝi de la horloĝo, trovis apude allogan benketon sub densa acero kaj eksidis ĉe unu el la randoj. Li tre maltrankviligis: ja estis la unua rendevuo de lia filino!

Atendante la sepan, Jurij Petroviĉ prenis el sia retsako pakajeton da bu-

terpanoj, zorgeme preparitaj de la edzino, kaj senbrue ekmanĝis.

„Certe, ne estas bone, ke mi sidas ĉi tie, en embusko, — pensis li, rigardante la teritorion ĉe la horloĝo. — Sed, aliflanke, ŝi estas unusola filino, ankoraŭ infano! Ekrigardi almenaŭ, kiel li aspektas... Ĉu tiu ruĝhara, kiu staras kun floroj? Tro dika kaj malalta li estas, sed ŝajne, kun inteligenta vizaĝo. Se estus li el bona familio! ... Ne drinkulo... Kaj, dezirinde, jam eksa soldato. Ah, jen ankaŭ ŝi venis, mia Natali! — ekkriis senvoĉe Jurij Petroviĉ. — Al tiu ruĝharulo. La florojn li enmanigas al ŝi... Salutas ili unu la alian, multe interparolas...“

Jurij Petroviĉ ektemis subite: ie tute apude oni ektusis. Li disŝovis la arbobranĉojn kaj vidis virinon, kiu

vuoj, kie estis publikigitaj niaj leteroj.

Esperanto servis kiel ligilo kun USSR ankaŭ al multaj esperantistoj el Bulgario kaj Aŭstrio, kies leterojn ni transsendadis al USSR, ĉar la demokratiaj leĝoj de la Ĉeĥoslovaka Respubliko ankoraŭ permesis tion. Ni havis ankaŭ kontaktojn kun la lokaj progresemaj ĉeĥoslovakaj esperantistoj. La eldonata tiutempe en Bulgario ĵurnalo „Rabselkor“* publikigis multajn leterojn de esperantistoj el aliaj landoj kaj multaj numeroj de tiu ĉi ĵurnalo estis vendataj inter la gestudentoj en Brno.

En la komenco de 1933/1934 jaro mi estis elektita kiel prezidanto de la bulgara studenta societo „Levski“. Sed nia larĝa kontraŭfaŝisma kaj unuecfrota agado de tago al tago ĉiam pli kaj pli malkvietigis la ĉeĥoslovakon policon, kiu en ĉiun nian kunvenon aŭ alian aranĝon sendis siajn sekretajn aŭ malkaŝajn agentojn. La okazo kun kamarado Petro Bogov dum la unuamaja manifestacio en 1934 estis motivo por la polico preni de-

cidon pri la malfondo de la societo. Tame ĝi ne forgesis ankaŭ min kiel ĝian prezidanton.

Iun frumatenton ĉe junio 1934 — ĉe la fino de la lernojaro — en mian loĝejon venis policanoj, kiuj min arestis kaj kondukis al la studenta manĝejo; tie ili sigelis la libroŝrankon kaj konfiskis la dokumentaron de la societo, poste veturigis min al la policejo. El la pridemando mi komprenis, ke la societo estas malfondita kaj ĝiaj aktivuloj — arestitaj. Ĉe la pridemando mi deklaris, ke mi estas kontraŭfaŝisto, sed kiel studento ne okupiganta pri politiko. La polica inspektoro d-ro Vah kvazaŭ nur tion atendis — ke mi konfesu, ke mi estas kontraŭfaŝisto; li frenezigis dirante, ke por mi loko en la Ĉeĥoslovaka Respubliko ne estas kaj ke mi ne plu rajtas reveni tien. Lige kun tio li donis al mi subskribi ian dokumenton.

Tiu ĉi decido de la polico estis fatala por mi, ĉar restis nur unu jaro ĝis la fino de mia studado.

Sed per la helpo de mia partia grupo kaj de la ĉeĥoslovakaj kamaradoj, per la helpo de rekomendita de ili advokato oni permesis al mi reveni la sekvan jaron kaj fari sukcese miajn lastajn ekzamenojn.

El la bulgara: D. Haĝlev

* „Rabselkor“ — vortkunmetaĵo el la unuaj silaboj de la bulgaraj vortoj por „Laborista-Kampana Korespondanto“ — bulgaringva peresperanta ilustrita ĵurnalo, eldonita de la Laborista E-Asocio Bulgara ekde 1933 ĝis majo 1934. Aperis entute 35 numeroj.

sidis sur seĝeto ĉe la alia flanko de la acero kaj rigardis per binoklo.

— Arkadij, — sin prezentis la virino, montrinte la ruĝharulon. — Mia filo.

— Natali, — siavice sin prezentis Jurij Petroviĉ. — La filino.

— Li estas ankoraŭ knabo! — diris iom ruĝiginte la virino. — Tute hazarde mi eksciis pri la okazonta rendezuo kaj preskaŭ malfruis! Arkadij montriĝis tre kapabla inĝeniero. Sed — inter ni — li estas tro singena. Kaj kio vi estas?

— Studentino.

Eksilento.

Jurij Petroviĉ subite sentis, ke necesas ion diri tuje, aliokaze la parolo tute malaperos, perdiĝos, kvazaŭ blovo de la vento inter la aceraĵoj, kaj ili povas disiri facile kaj neniam plu renkontiĝi. Neniam!...

— Bonvolu gustumi! — kun tremanta voĉo diris Jurij Petroviĉ, kaj proponis al la nekonatino la retsakon kun la buterpanoj.

— Ne, ne! — La virino mansvingis. — Mi dietas! — Ŝi ĵetis al la retsako suspektan rigardon kaj faltis la vizaĝon. — Vi, verŝajne jam estas tre sperta?

— La unua rendezuo, — ekflustris Jurij Petroviĉ. — Ĝis vi, kredu min, ni kun neniu kaj neniam...

— Ni ankaŭ la unuan havas, — konfesis la virino.

— Inter alie, mi mem kudras, — neatendite eĉ por si mem fanfarone deklaris Jurij Petroviĉ. — Ankaŭ trikas mi. . .

— Kaj mi estas boksisto de dua kategorio! — ekfanfaronis la virino.

— Krome, mi bonege kuiras, — ne cedis Jurij Petroviĉ. — Mi mem ankaŭ lavas la tolaĵojn! Ne dorlotita mi estas, . .

— Sed mi majstras ĉiun metion! La tuta loĝejo estas plenplena de marteloj kaj fajliloj. Jes! En kioma kurso vi studas?

— Nur du semestroj restis, ĝis mi finos la instituton. Poste — la praktiko. . .

— Nu jen venis la tempo por pripensi la alian vivon. Mi mem, interalie, edziniĝis, kiam mi estis samaĝa, kiel ŝi nun. Memoras mi: la edzo tra la tuta urbo marŝis kun florbazo por fari la edziĝproponon.

— Mi nun preskaŭ ne pensas pri edziniĝo! — fiere diris Jurij Petroviĉ. — Kredu, por mi la plej ĉefa tasko estas la studado! Por la sekva rendezuo, se vi permesos, mi alportos la studentan libreton, kaj vi vidos — nur perfektaj poentoj. Kaj kiel ni ludas pianon! . . .

— Sed ni ludas fluton. Ho, kiom kostis tio al mi! — La virino elprenis nazitukon. — Mi mem admonis min: „Ne necesas plori! Ploru niaj malamikoj!“ Sed ĉu elkreskas infanoj sen gepatraj larmoj?

Subite ekblovis malvarma vento. Jurij Petroviĉ demetis la jakon kaj metis ĝin sur la ŝultrojn de la virino.

— Kiel bone estas, — diris li, — se komence la gepatroj interkonatiĝas, kaj poste jam, se ĉio bonus, la infanoj. . .

Aperis steloj. Unu el ili subite deglitis el la firmamento.

— Ĉu vi ion ekdeziris? — preskaŭ neaŭdeble demandis ŝi.

— Jes, — respondis li mallaŭte.

— Sed kion?

— Malvarme estas nun, sed Natali ne tre bone sin vestis. Mi ekpensis, ĉu ŝi ne malvarmumos. . . Realigis! — ekkriis li. — Rigardu, Arkadij donis al ŝi sian jakon. — Jurij Petroviĉ turnis sin al la virino kaj kortuŝe diris: — Dankon! — Kaj sen ia logika ligo denove ekparolis pri la studenta libreto. . .

— Kiam ni denove ĉi tie renkontiĝos, mi nepre alportos ĝin.

— Por kia celo ĉi tie? Ni povus ĉe ni, hejme. . .

Sub la acero komenciĝis intersanĝo de la adresoj.

— Loĝos ni ĉe ni, — elblovis Jurij Petroviĉ kaj, kvazaŭ pro timo, ke oni lin interrompos, rapide ekparolis: — Triĉambra loĝejo en nova kvartalo



PENJO VERKIS ANKAŬ EN ESPERANTO

Kun Penjo Penev ni estis kunlernantoj en la klasika klaso de la knabina gimnazio en Sevlievo. Tio estis la unua lernoĵaro post la popola venko je la 9 de septembro 1944*. La lecionoj komenciĝis malfrue — je la mezo de oktobro — pro la grandaj politikaj eventoj en la lando. Nia klaso estis formita aldone laŭ iniciato de la instruisto-esperantisto kaj fakulo pri slavaj lingvoj Simeon Hesapčiev.

du balkonoj, lifto, balaaĵotublinio...

— Sed ni havas somerdomon, pina arbaro apudas, tia aero! Ĉiumatene oni povas observi sunleviĝon... Atendu, kien vi? — ekkriis subite la virino.

— Dio mia! Ili disiras en diversajn flankojn! Ĉu interkverelo?

Jurij Petroviĉ apenaŭ ĝisatendis sian vicon, prenis la binoklon.

— Jes, tio estas kverelo kaj, videble, por ĉiam... Li prenis de Natali la jakon! Sed estas ja malvarme... —

En iu novembra tago ankaŭ mi fariĝis „klasikulo“. La klaso estis malgranda — mi trafis tie ĉirkaŭ dudek gelernantojn. Jam en la unua interlekciona paŭzo min forte impresis unu iom blonda lernanto kun abunda hararo, sidanta sur la unua benko. Dum la aliaj gelernantoj petolis, li restis sur la benko kaj ofte kombis kaj hirtigis siajn harojn. Tiu lernanto impresis kiel distrita kaj fermita homo. Oni diris, ke li estas poeto.

Kaj vere, baldaŭ, en la studhororo de nia klasestrino Ivanka Kalkangieva li tralegis sian parcdion de la konata versaĵo de P. K. Javorov „Sur la agro“. En ĝi Penjo sukcesis esprimi la travivaĵojn de la vilaĝinfanoj, kreskantaj sur agroj kaj paŝtejoj. Ni estis forte impresitaj de lia scipovo deklami esprime. Tio estis unu el la karakterizaj trajtoj de la estonta poeto.

Jam tiam Penjo vivis kun la espero fariĝi poeto, eldoni sian verskolekton kaj obstine preparis sin por tio. Li jam bone konis la poezion de Javorov kaj Puŝkin, obstine studis la poezion de Lermontov kaj Smirnenski.

En la sekva jaro la klasika klaso estis nuligita. Mi kaj Penjo trafis diversajn klasojn de la knaba gimnazio, sed ni loĝis proksime unu de la alia, kaj nia sincera amikeco daŭris plu.

* 9. IX. 1944 — la tago de liberiĝo de la bulgara popolo elsub la jugo de kapitalismo kaj faŝismo.

Jurij Petroviĉ sin turnis al la virino: — Nu, ĉu tiel oni povas?

— Sed vi? Tiel traŭmi la knabon!...

La virino ekkuris post la filo.

— Adiaŭ-ŭ-ŭ! — ekkriis Jurij Petroviĉ kaj kun la jako sin ĵetis en kontraŭan flankon.

Kiam Natali kaj Arkadij sekvan tage paciĝis kaj denove renkontiĝis en la parko, apud la acero estis neniu...

El la rusa: Dmitrij Cibulevskij

La sukcesoj de Penjo en la poezio ĝojigis ĉiujn. Por la tuta gimnazio li jam estis Penjo la Poeto.

En la IX klaso Penjo entuziasmiĝis pri Esperanto kaj komencis ĝin lerni sola. Li ankaŭ verkis en Esperanto. Kaj malgraŭ ke lia vortaro ankoraŭ estis malriĉa, li, kun facileco karakteriza por li, sukcese versumis ankaŭ en Esperanto. Kelkajn versaĵojn en Espe-

ranto li tralegis ankaŭ al mi.

Jam tridek jaroj nin disigas de la tempo, kiam Penjo kreis tiujn ĉi versaĵojn de lernanto, sed kia estas ilia sorto, ĉu oni konservis ilin, mi ne scias. Estus bone, ke oni ilin eltrovu kaj ili havu lokon en la aranĝota muzea kolekto de la poeto en lia naskiĝdomo en Dobromirka.

Dimo Todorov

PENJU MEM NOMIS SIN INTERNACIISTO-ESPERANTISTO

En la frua aŭtuno de 1951 mi, post ekzamenoj, ripozis kelkan tempon en mia naskiĝvilaĝo Dobromirka. Tage mi helpis al miaj gepatroj en la agrikultura laborkooperativo, vespere mi eliris sur la ĉefstraton por iom promenadi.

Tute hazarde ni renkontiĝis surstrate kun Penjo. Vidinte min li multe ekĝojis — ja delonge ni ne renkontis unu la alian. Penjo ĵus estis ekŝinginta el la militservo kaj same kiel mi iom ripozis ĉe siaj gepatroj. Laŭvide li estis tre vigla, kun alta memsento.

Ni havis tiom da aferoj por rakonti unu al la alia! Ja ni estis ne nur amikoj, sed ankaŭ parencoj — niaj avoj estis fratoj. Nur tio sufiĉis, ke ni konkuradu unu kun la alia en la interparolado — ĉiu deziris rakonti pli pri siaj travivaĵoj, pri si mem. Sed aldoniĝis io aparte grava: nia intereso al la poezio. Penjo jam havis tre bonajn sukcesojn sur tiu ĉi kampo, sed multaj ne komprenis lin, primokis lian liron. Li sincere plendis antaŭ mi pri tio, estante certa, ke mi deprenos iom de lia ĉagreno. Kaj tiel estis: mi kredis je li, mi alte taksis liajn verkojn. . . En tiu vespero Penjo entuziasme deklamis al mi siajn plej novajn versojn.

Kelkajn vesperojn ni pasigis kune, restante ĝis malfrue dum la ankoraŭ varmaj lunoriĉaj aŭtunaj noktoj.

Kaj iufoje Penjo mem ekparolis pri

la internacia lingvo Esperanto, kiu jam antaŭ la 9 de septembro estis vaste konata en nia vilaĝo kaj ĝuis altan reputacion ĉe nia junularo. Li rakontis al mi kiel li lernis la lingvon en la gimnazio de Sevlievo, pri la kontaktoj, kiujn li havis kun la posedantoj de Esperanto-librejo kaj presejo „Fraterco“ en tiu urbo ktp. Kaj ni tute nature venis al la junula aventuro, kiun Penjo havis en la 11-a klaso de la gimnazio, verŝajne la printempon de 1948. Same kiel la fama angla poeto Bajron (Byron), li tiam decidis iri Grekujon kaj batali por la liberigo de la greka popolo — kontraŭ la faŝismo. Penjo anticipe preparis paroladon, per kiu li intencis prezenti sin antaŭ la komandanto de la partizanoj. Kaj nun kun granda entuziasmo li komencis rediri ĝin al mi:

„— Miaj karaj geamikoj! Mi venis tien ĉi por batali kontraŭ la faŝistoj — por via libero. Mi estas internaciisto — bulgara esperantisto. . .“ — ktp.

Por mi, kiel esperantisto, estis tre impresa la fakto, ke Penjo preparis sian paroladon en Esperanto kaj ankaŭ nun diras ĝin en Esperanto kun forta revolucia vervo.

Tiu ĉi vespero, kiam mi kaj Penjo parolis pri Esperanto, restis ĉe mi neforgesebla. Min kortuŝis lia senprofiat oferpreteco, lia junula impeto helpi al la liberama greka popolo, suferanta sub la jugo de kapitalismo kaj faŝismo.



NI GARDU LA PACON!

(Marŝo)

Nin gvidas la standardo bela
de amikeco, paco, hel'.
Al ĉiu land' ni venas plenaj
de frata amo kaj fidel'.

Ni kiel Zamenhof laboras.
Komuna lingvo ligas nin.
Ni kreas la mirinde belan
progreson en la mond' sen lim'.

Nin ne disigas haŭtkoloro,
nek religi', nek sekso jam,
ĉar tiel diktas al la koro
la leĝo de la homa am'.

Sub nia verda stel' brilanta
en universo tuta nun,
per nia lingvo Esperanto
batalas ni por pac' kaj lum'.

Jen, kamarado, mano mia, —
vi prenu, forte tenu ĝin!
En kunvivado harmonia
beleco unuigu nin!

Refereno :

Antaŭen, kun impeto nobla,
samideanoj, iru ni! Antaŭen iru ni!

El la bulgara: Rosica Georgieva

KOMPONISTOJ, ATENTU!

Vi estas petataj fari konvenan melodion por la supra marŝo kaj sendi ĝin al la redakcio de „Bulgara Esperantisto“ ĝis la 5 de aprilo 1977.

La plej bonan melodion ni premios kaj aperigos.

La Red.

TRA LA E★ MONDO

ĈE LA GERMANAJ GEAMIKOJ

De la 4 ĝis la 7 de novembro en Lajpcig (Leipzig) okazis la II Centra Konferenco de la Esperantistoj en GDR. Nia bulgara delegitaro por la Konferenco konsistis el kvar personoj.

Speciale invitita de la Distrikta Laborrondo Esperanto en Lajpcig kiel ĝia honora membro, mi jam ĉe la stacidomo havis agrablan surpri-

zon: min renkontis la prezidanto Jürgen Hamann, senlaca kaj energia juna esperantisto.

La 4-an de novembro, vespere, la lajpcigaj esperantistoj organizis interesan renkontiĝon de neesperantista publiko kun la eksterlandaj gastoj el Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Hun-

Evidente, Penjo sincere preparis sin por tiu batalo, gvidata de pura idealismo kaj de la internacia ideo pri frateco inter la popoloj, opiniante ke nepre en tiu momento estas ege grava uzi la internacian lingvon Esperanto.

Ĉe nia renkontiĝo je la 1 de novembro 1957 en Veliko Târnovo (tiam okazis poezia vespero, kiun Penjo partoprenis kiel juna poeto) ni denove parolis pri Esperanto. Sed pli multe li elveŝis sian ĉagrenon pro tio, ke

lia entuziasma junula poezio de la socialisma konstruado ankoraŭ ne estas rekonita. Tiam Penjo recitis al mi sian versaĵon „Epoko“ kaj donacis al mi la lastan ekzempleron de sia unua poezia kolekto „Bonan matenon, homoj!“ kun aŭtografo sur du paĝoj. Ankaŭ nun, legante la vortojn de tiu aŭtografo, oni profunde emociiĝas pro la suferoj kaj la homamo de tiu granda, sentema koro, kiu tiel frue ĉesis pulsi.

Stanĉo R. Drebov

gario, Pollando, Sovetunio. La ĉeestantoj havis eblecon starigi plej diversajn demandojn kaj ricevi respondojn pere de tradukantoj. Tio estas efika formo de E-propagando, kiun oni devas apliki ĉiulande.

La sekvan tagon okazis konsulta renkontiĝo de la E-delegitaroj. Oni raportis pri la plej gravaj atingoj kaj malfacilaĵoj en la E-agado en diversaj landoj, interŝanĝis spertojn.

Vespere okazis la tradicia interkona kunesto.

La 6-an matene estis solene inaŭgurita la E-Konferenco mem. En la prezidantaro sidis ankaŭ oficialaj gastoj el Kulturbund (Kulturlogo) de GDR. Malfermajn vortojn diris la prezidanto de Centra Laborrondo Esperanto Rudi Grec (Graetz). Junpionira grupo enmanigis florbukedojn al la prezidantaro kaj la gastoj kaj per mallonga artprogramo agrable surprizis kaj kortuŝis ĉiujn. Sekvis salutparoladoj de germanaj esperantistoj kaj eksterlandaj gastoj.

Posttagmeze la Konferenco daŭrigis sian

streĉan laboron.

Vespere estis prezentita belarta programo, kiun partoprenis kantiĥoro el Lajpcig kaj la artisto-kantisto el ĈSSR Miroslav Smička. Mi ankaŭ partoprenis per kelkaj E-recitaĵoj.

La 7-an oni elektis la novan estraron. Posttagmeze okazis interesaj fakprelegoj de eksterlandaj gastoj — Jeji Grum el Radio Varsovio, d-ro Arpad Ratkai el Hungario ka. Tio ankaŭ estis tre bona iniciato de la germanaj amikoj.

Vespere okazis oficiala akcepto por la eksterlandaj gastoj kaj aktivuloj de la E-movado en GDR. La prezidanto R. Grec enmanigis donacojn al la eksterlandanoj kaj dankis pro ilia kontribuo por la sukceso de la Konferenco.

Inter la germanaj geamikoj ni sentis nin dum la tuta tempo kiel hejme. Simpatio, amikaj sentoj kaj korvarmeco regis ĉiam kaj ĉie ĉirkaŭ ni.

Vasja Petrova

PER ESPERANTO TRA ĈEĤOSLOVAKIO KAJ POLLANDO

e Lige kun la 39-a kongreso de la bulgaraj esperantistoj E-societo „Ivan Vlačkov“ en u. Drjanovo montris diversflankan aktivecon. Interalie ĝi organizis por siaj membroj du ekskursojn al eksterlando — al la frataj socialismaj respublikoj Ĉeĥoslovakio kaj Pollando.

Al Ĉeĥoslovakio forveturis por partopreni la Someran E-Lernejon en Dudince 28 personoj, precipe gelernantoj el la ekonomia teknikumo „Raĉo Stojanov“. En ĈSSR la junuloj pasigis 20 tagojn (4—24 de julio). Dum du semajnoj ili perfektigis sin en la lingvo, ĝuis internacian medion (la lernejon partoprenis ankaŭ poloj, hungaroj, japanoj kaj dommastroj, kompreneble), sin banis en subĉiela mineralakva baseno, amuziĝis. Preskaŭ ĉiuvespere la lernejoj prezentis belartajn programojn, en kiuj ĉiu grupo montris karakterizaĵojn de sia nacio. Fine ili ricevis diplomojn por finita E-kurso.

La trian semajnon la grupo partoprenis la Internacian Turistan E-Semajnon en u. Zvolen. Dum la Semajno ili havis eblecon grimpi sur la Altaj kaj Malaltaj Tatroj, konatiĝis kun multaj turistaj objektoj, historiaj kaj kulturaj rimarkindaĵoj, vizitis kelkajn urbojn inkluzive la historian Banska Bistrica kaj la

ĉefurbon de Slovakio Bratislava.

Alia grupo, same el 28 personoj, precipe plenaĝuloj, forveturis al Pollando la 6-an de aŭgusto. La aranĝo estis organizita surbaze de la turista kontrakto inter la Distrikta Estraro de BEA en Smoljan kaj la junulara ŝtata turista agentejo „Juventur“ en Pollando. La vojaĝo kaj reveno estis per aviadilo. En Pollando la grupo restis 15 tagojn kaj ricevis plej riĉajn impresojn pri la vivo kaj vidindaĵoj de la frata lando. Per buso ĝi traveturis preskaŭ tutan Pollandon kaj konatiĝis kun la ĉefurbo Varsovio, la ubroj Jelezova Volja, Ludŝ, Vroclavek, Lipno, Torun, Plock, Ĉeĥoslovakio, Ŝelmica, Gdansk, Oliva, Sopot, Gdinja, Ŝtutgoj, Malburg ka. Ĝi boatis sur riveroj kaj lagoj, ĝuis la Baltan Maron. Dum la tuta veturado gvidis ilin la lerta junulo Jurek, pri kiu ĉiuj konservis plej belajn memorojn. La grupo havis renkontiĝojn kun lokaj esperantistoj, interŝanĝis memoraĵojn. Ĝi eksciis multon pri la heroo pasinteco de la pola popolo, pri ĝia feliĉa nuntempo, pri la ĉiufanka supreniro de socialisma Pollando.

Ambaŭ aranĝoj tre entuziasmigis la membraron de la E-societo kaj faris fortan impreson al la neesperantista publiko.

ESPERANTISTOJ EL SVIŜTOV EN GDR

De la 5 ĝis la 18 de septembro grupo da esperantistoj el societo „Danuba Stelo“ — Sviŝtov, partoprenis internacian tendaron de esperantistoj el socialismaj landoj (USSR, Pollando, ĈSSR, Bulgario, GDR), kiu okazis sur la bordo de la lago Krosinsee apud Berlino. El ĉi tiu bela turista komplekso oni entreprenis vizitojn de rimarkindaĵoj, kiel la palaco San Susi (Sans-Souci) en Polzdam, la

muzea komplekso en la centro de Berlino, konsistanta el la muzeo de germana historio, la muzeo de egipta historio, la muzeo de orientazia kulturo, la artgalerio ka. Vizitita estis ankaŭ la memorkomplekso de la Soveta Armeo en Treptov-parko.

Antaŭ la partoprenantoj en la renkontiĝo parolis Detlev Blanke — d-ro de la filologiaj sciencoj, kiu priskribis la E-movadon en la



socialismaj landoj kaj la formojn de interŝanĝo de informoj kaj spertoj inter ili. Estis projekciitaj esperantlingvaj filmoj pri la atingoj de GDR.

La 9-an de septembro en la kultura klubo de la tendaro la bulgara grupo, konsistanta el esperantistoj de Sviŝtov, Ruse, Târgoviște kaj Pleven, disdonis al la dommastroj kaj la ceteraj tendaranoj prospektojn pri Bulgario en Esperanto, memoraĵojn, bildkartojn ka. Lige kun nia nacia festo amike salutis nin la E-veterano Ernesto Ŝonert, gvidanto de la tendaro, kaj reprezentantoj de la diversnaciaj grupoj.

En la tago, fiksita kiel libera, la grupo de Sviŝtov, en kiu partoprenis ankaŭ inĝenier-teknikaj kadroj el uzino „Sviloza“, kuraĝistoj el la Unuigita Hospitalo en Sviŝtov, ekonomikistoj ka., vojaĝis al Lajpcig, kie

vizitis la muzeon de Georgi Dimitrov kaj la foiron.

Krome la dommastroj organizis viziton de la zoologia ĝardeno en Berlino, la televidaturo, la kastelo Kjøpenik, la Brandenburg-pordo kaj en Potzdam vizito de la palaco Cecilienhof, kie en 1945 okazis la Konferenco de la Grandaj Fortoj.

Ĉiuj ni revenis ege kontentaj kaj dankaj al la germanaj geamikoj, kiuj tiel bone organizis la tendaron ĉe Krosinsee. Ĉiuj ni kolektis riĉajn impresojn pri la grandaj atingoj de GDR en la socia disvolviĝo, pri la alta kulturo de la sociaj rilatoj kaj en la privata vivo de la germanaj homoj.

Ni kredas, ke similaj aranĝoj multe kontribuas por firmigo de amikeco kaj unueco inter la frataj socialismaj landoj.

ing. Mitko Nenkov

ESPERANTO EN KOMUNA LABORO DE PEDAGOGOJ

La unuan fojon verŝajne en la historio de la E-movado tre grava internacia pedagogia asocio adoptis Esperanton kiel unu el siaj ĉefaj laborlingvoj.

Tiu ĉi asocio estas FIMEM (Internacia Federacio de la Movadoj por Moderna Edukado), kiu arigas asociojn el 38 landoj kaj ĉiujare organizas Internacian Pedagogian Kongreson — RIDEF (Internacia Renkontiĝo de Freinet-Edukistoj).

Dum la ok unuaj RIDEF ne estis pli ol du aŭ tri esperantistoj inter la 150 aŭ 200 partoprenantoj. La lingvaj problemoj estis ĉiam gravaj kaj neniun solvon oni antaŭvidis.

Sed en 1975 la esperantista grupo ĉe FIMEM alprenis la taskon organizi la venontan RIDEF en Pollando. Ĝi decidis, ke Esperanto fariĝu unu el la ĉefaj laborlingvoj de la Renkontiĝo.

Pli ol dudek partoprenantoj en RIDEF komencis lerni Esperanton en la Esperanta Kulturdomo (Kastelo de Gresillon) en Francio, ankaŭ 15 aliaj tie perfektigis kaj ekzercigis sin antaŭ la Renkontiĝo. Kiam ĝi komenciĝis en Pollando, inter la 150 partoprenantoj troviĝis pli ol 50 esperantistoj el 5 landoj.

Esperanto estis agnoskita kaj utiligata kiel laborlingvo, samrajte kiel la franca kaj la pola, la du aliaj oficialaj lingvoj. Ĉiuj laborkunvenoj okazis en la tri lingvoj, ankaŭ la oficiala ĉiutaga bulteno aperis en tri eldonoj: franca, pola, Esperanta. En sia ĉi-jara ĝenerala asembleo FIMEM adoptis preskaŭ unuanime (nur 4 sindetenoj) rezolucion rekomendantan Esperanton kiel laborlingvon de la Federacio.

Antaŭ la Renkontiĝo koresponda servo ebligis al multaj eksterlandaj kolegoj starigi korespondadon en Esperanto — ĉu personan, ĉu interiliaj klasoj.

Reciproka gastigado-servo donis eblecon a multnombraj eksterlandaj kolegoj gastis dum certa tempo post la Renkontiĝo en polaj esperantistaj familioj.

Tiel antaŭ la Renkontiĝo (per persona aŭ interlerneja korespondado), dum la Renkontiĝo (en la ĝeneralaj kunvenoj, en la laborgrupoj, en la persönaj kontaktoj, dum la vizitoj kaj la ekskursoj), post la Renkontiĝo (gastado en polaj familioj, daŭra korespondado, akceptado fare de polaj amikoj hejme) Esperanto estis (kaj estos!) realo konkreta kaj vivanta.

Tri intervjuoj de Radio Varsovio, multnombraj artikoloj en gazetoj polaj aŭ diverslandaj raportis pri tiu ĉi Renkontiĝo, ĉiujfoje menciante la uzadon de Esperanto.

La Internacia Pedagogia Renkontiĝo estis, sendube, grava sukceso por Esperanto. Tiu sukceso devas kreski ĉiujare: la venonta Internacia Renkontiĝo okazos en Lisbono (Portugalia) en la dua duono de julio 1977. Ĉiuj esperantistoj (instruistoj, profesoroj, gepatroj de lernantoj) aŭ tute simple ĉiuj, kiuj interesiĝas pri edukaj problemoj aŭ pri Portugalia rajtas partopreni la Renkontiĝon.

Sed bone pripensu tion: skribu tuj al Henri Menard, Le Pallet 44330 Vallet, Francio, por ricevi ĝustatempe informojn kaj slipojn necesajn por definitiva aliĝo kaj registrado.

Jean Marin

organizinto de RIDEF en Pollando

FELIĈAN NOVJARON!

SANON, ĜOJON, NOVAJN SUKCESOJN
SUR LA VERDA KAMPO!



MALLONGE PRI MIA VIZITO EN BULGARIO

Sergej Krajinov

vicprezidanto de la Internacia E-Klubo en Moskvo

Invitite de la prezidanto de Mondpaca Esperantista Movado k-do Nikola Aleksiev, de la Bulgara E-Asocio kaj la Internacia Ligo de Agrikulturaj Specialistoj-Esperantistoj, mi estis en Bulgario de la 7 de septembro ĝis la 15 de oktobro. Krom en Sofio, kie mi restis dufoje, kaj en Plovdiv (dum la Internacia Foiro), mi vizitis la loĝlokojn Pazarĝik, Kazanlâk, Peŝtera, Bracigovo, Velingrad kaj kelkajn aliajn kaj konatiĝis kun multaj historiaj monumentoj kaj aliaj rimarkindaĵoj.

Ili rakontis al mi pri la miljara dramoplena kaj heroa historio de la bulgara popolo. Dum la kvinjarcenta otomana jugo oni kun nekred-



ebla krueleco turmentis kaj mortigis ĉiujn, kiuj rezistis kaj ne konsentis esti sklavoj de la sultanoj. La subpremantoj bruligis kaj nenigis tutajn vilaĝojn kaj urbojn. Kaj tamen la popolo eltenis kaj venkis. Ties heroaĵo havas tutmondan signifon — ĝi povas inspiri ĉiun popolon, kiu batalas por sia liberigo.

Dum la tuta tempo de mia restado en Bulgario min ne forlasis la sento de profunda esimo kaj kliniĝo antaŭ la bulgara popolo, kiu en la tuta lando dum jarcentoj sankte gardas la memoron pri siaj herojaj prauloj, sukcesis konservi kaj disvolvi sian nacian kulturon.

Ĉie konate estas, kiel sincere kaj varme la bulgaroj rilatas al la rusa popolo, kiu ĉe multaj generacioj donis helpon al Bulgario. Sed oni mem devas esti en tiu lando, por plene eksenti la forton kaj la konstantecon de la frataj sentoj kaj la dankon de la tuta bulgara popolo al Soveta Unio.

Per kio do mi povas rekompenci la gastamon kaj la kortuŝan atenton al mi? Respon-

de al la peto de bulgaraj organizaĵoj mi pre-
paris detalan lecion pri la hipofeo, dek tabe-
lojn kaj diagramojn, grandan kolekton de
freŝaj branĉetoj de hipofeo kun la fruktoj,
afable disponigitaj al mi de T. T. Trofimov —
supera scienca kunlaboranto de la Botanika
Ĝardeno ĉe Moskva Ŝtata Universitato, ankaŭ
interesajn fotojn, faritajn de la elstara spe-
cialisto pri hipofeo S. N. Kovaljov. La lek-
cion mi tralegis en jenaj institucioj kaj orga-
nizaĵoj: Sciencesplora Instituto de Frukto-
kulturado en Plovdiv, Sciencesplora Instituto
de Rozo, Eteroleaj kaj Kuracaj Plan'oj en
Kazanlâk, Ministerio de la Forsta Mastrumo,
Ministerio de la Agrikultura Mastrumo, Mini-
sterio de la Popola Sanprotekto (polikliniko
de fitoterapio — nura sur la Balkana Duonin-
sulo).

Krome la lekcio estis legita en kvin E-or-
ganizoj en diversaj urboj, inkluzive du ripoz-
domojn (unu fojon por bulgaroj, aliffoje po-
poloj — kun tradukanto). La kunvenojn ĉeesti
inter 30—80 homoj.

En ĉiuj okazoj la lekcio estis aŭskultita kun
granda atento. Ĝi ricevis altan prilakson kaj
sinceran dankon, kelkfoje en skriba formo.
Multloke ankaŭ elstaraj sciencistoj estis in-
vititaj al la lekcio.

Nuntempe la hipofeo renkontiĝas kelkloke
en la nordorienta parto de la lando (Tolbuhin-
distrikto) kaj malofte en la monta zono de la
suda. El malofte renkontata kaj senutila kres-
kaĵo ĝi devas esti metita en servon al la san-
protekto kaj aplikata en la produktado kiel
plenrajta ĝardeno kaj arbara kulturo. En la
agrikultura ekonomiko kaj en la sanprotekto
de Bulgario ĝi povas okupi indan lokon
kiel kuraca, nutra, furaĝa, grundoboniga kaj
dekoracia planto. Mi ne dubas, ke kelkaj el
la menciitaj institutoj kaj polikliniko oku-
piĝos pri ĝi.

Espereble ankaŭ la interesitaj ministerioj
dediĉos atenton al la starigita problemo. La
sovetaj institucioj, kompreneble, donos la
necesan helpon.

Mi ankaŭ kontaktigis bulgarajn gelernan-
tojn de 6-a kaj 7-a klasoj, studentajn rusan
lingvon, kun gelernantoj el moskvaj lernejoj.

Komisiite de la E-Komisiono ĉe la Domo
de Amikeco ĉe la Unuiĝo de Societoj
de Amikeco kun Eksterlando, mi transdonis
donace al la Bulgara E-Asocio la filmon „Unu-
iĝo nerompebla“ kun esperantlingva parolo,
same 150 ekzemplerojn de la eldonita en
Moskvo revuo „Paco“, kiuj estis distribuitaj
por la E-organizoj.

En ĉiuj supremenciitaj loĝlokoj mi faris
lecion pri la hipofeo kaj rakontis pri la
E-movado en USSR, transdonante la fratajn
salutojn de la moskvaj esperantistoj.



Karaj bulgaraj geamikoj!

Deziro skribi al vi leteron pere de „Bulgara Esperantisto“ regis min jam en la vagono, kiam mi veturis hejmen, sed kelkaj kaŭzoj malhelpis al mi skribi pli frue. Tamen la proverbo diras: „Pli bone malfrue ol neniam“.

Mi ne povas deteni mian senliman varman dankon al vi, kiuj tiel sincere, tiel amike, kun malfermita animo akceptadis min dum mia tutmonata vojaĝo tra via bela lando.

Unue, mi volas danki al la organizantoj de la 39-a kongreso de bulgaraj esperantistoj, kiuj invitis min, donis al mi la feliĉon partopreni unuafoje en mia vivo E-kongreson kaj MEM-konferencon.

Estinte en granda internacia esperantista familio mi sentis min bonege, „kiel fiŝo en akvo“, kvazaŭ oni injektis min per freŝiga juna sango. Influis mian humoron ankaŭ la kreskanta kvanto de amikoj. Apartan dankon al la organizantoj pro la koncerto kaj la balo. La bonegaj impresoj pri la kongreso kaj la MEM-konferenco restos en mia memoro dum la tuta vivo.

Mankas vortoj, per kiuj mi povus esprimi mian dankon al ĉiuj vi, geamikoj el la urboj Ruse, Sofio, Gabrovo, Kazanlâk, Stara Zagora, Burgas kaj Varna, en kiuj mi gastis. Vi ne nur donis al mi bonan loĝejon, sed ĉiuminu'e mi sentis vian malavaran, vastan gastamon, sinceran prizorgon kaj atenton al mi. Mi konfesas, ke fojfoje mi sentis min ĝenata pro tiu granda atento al mi — ordinara, maljuna rusa virino.

Sed mi konvinkiĝis, ke la bulgaraj homoj ne povas kondukti alimaniere.

Dank' al vi, miaj karaj, mi pli bone ekkonis vian fratan popolon, vian belegan, pitoreskan landon kun multnombraj arkitekturaj monumentoj kaj tre interesaj muroj. Miaj impresoj estas variaj kaj riĉaj, por priskribi ilin necesas esti poeto. Sed mi volas mencii nur pri kelkaj renkontoj, kiuj tre bone karakterizas la bulgarajn homojn.

Mi restis ne nur feliĉa, sed eĉ fiera, kiam oni invitis min en la Domon de la Bulgara-Soveta Amikeco en Ruse. Post sufiĉe longa kaj sincera interparolado oni donacis al mi la libron „Fratoj en batalo — fratoj en laboro“, albumon „Liberiga milito“ kaj alpinglis sur mian bruston la insignon de la bulgara-soveta amikeco kun la vortoj „Veĉna ĉrŭba“ („Eterna amikeco“) kaj la portretoj de V. Lenin kaj G. Dimitrov. Mia hazarda konatiĝo kun bulgara ĵurnalistino antaŭ naŭ jaroj en vagono kreskis ĝis vera amikeco. Eksciinta, ke mi estas en Sofio, ŝi sendis por mi aŭton kaj mi feliĉe pasigis kelkajn horojn en ŝia amika kaj afabla familio.

Sur montopinto Stoletoŭ tute nekonata homo proponis veturigi min en urbon Kazanlâk, kaj mi ne nur konatiĝis kun li kaj lia rusa edzino, sed ankaŭ vizitis ilin en Stara Zagora.

Kiam mi veturis el Burgas al Varna per la ŝipo „Kometa 6“, la mekanikisto ekvolis paroli kun mi ruslingve (lia instruisto pri la ŝipmekaniko estis ruso el Leningrado), regalis min kaj poste konatigis min kun la ŝipanaro. La kapitano invitis min ne nur en la ferdek-kajuton, sed ankaŭ ekskursi sur la maro post unu tago. Bedaŭrinde, mi ne povis fari tion.

Multe, tre multe da renkontiĝoj kun interesaj homoj en via amika lando por ĉiam restos en mia memoro. Multaj donacoj ankaŭ rememorigos la agrablajn tagojn, pasigitajn kun vi, miaj fidelaj geamikoj.

Mi sincere deziras al vi sanon kaj feliĉon en la vivo kaj grandajn sukcesojn en la E-agado.

Vivu Esperanto — la plej bona interkomprenilo!

„Veĉna druĵba“ inter niaj landoj!

Via fidela soveta amikino

Zoja Skvorcova

USSR, Kujbiŝev — 443010,
Galaktionovskaja 56—6.

**ETA KONVERSACIO KUN LA D-RO DE FILOLOGIAJ SCIENCOS
MAGOMET IZMAJLOVIĈ ISAEV**

Estante en Lajpcigo kiel membro de la bulgara delegitaro por la II Nacia Konferenco de la Esperantistoj en GDR, Vasja Petrova, membro de nia redakta komitato, en ordinara konversacio starigis kelkajn demandojn al d-ro MAGOMET ISAEV — gvidanto de la soveta delegitaro por la Konferenco, al kiuj la eminenta lingvisto afable respondis.

Kie kaj kiam vi naskiĝis, d-ro Isaev?

Mi naskiĝis en urbo Orĝonikidze, Nord-osetina Aŭtonoma Respubliko, en la jaro 1928.

Kiam vi komencis interesiĝi pri lingvoj ĝenerale?

Kiam mi havis 23 jarojn, en 1951, en Moskvo.

Kiom da lingvoj vi posedas?

Eble 6 — osetinan, taĝikan, persan, rusan, Esperanton kaj iomete anglan.

Kiu interesigis vin pri la Internacia Lingvo?

La forpasinta kaj eminenta soveta esperantisto prof. E. Bokarjov estis tiu, kiu interesigis min pri Esperanto. Li donis al mi ler-

nolibron, kaj mi ellernis la lingvon dum du monatoj. Do, mi preskaŭ ne studis ĝin.


Ĉu vi havis malfacilaĵojn dum la lernado de Esperanto?

Absolute ne.

Kaj kia estas via opinio pri la lingvo mem — gramatiko, konstruo, belsoneco?

Ĝi estas bonega, belsona, facila lingvo. Pli speciale min intereseas la logika konstruo de Esperanto. Ĝi estas perfekta.

Kion prezentas Esperanto por vi kaj ĝenerale?



Por mi Esperanto estas scienca celo. Mi okupiĝas pri la monda lingva problemo kaj mi serĉas vojon por ties solvo. Laŭ mia opinio, Esperanto ankaŭ staras sur tiu vojo. Mi pensas, ke la celo de la Internacia Lingvo estas nobla. Finfine ĝi povas venki en monda skalo kiel dua lingvo por ĉiuj popoloj. Nun

estas tempo, kiam la E-movado disvastigas, ĉar por tio ekzistas ĉiuj objektivaj kondiĉoj. Jen pro kio al Esperanto mi samtempe rigardas kiel al socia fenomeno por la solvo de la monda lingva problemo.

Kiam kaj kie Esperanto helpis al vi en iu pli komplika situacio?

Jes. En 1973 dum la Monda Kongreso de la Pacamaj Fortoj en Moskvo. Dank' al tiu logika, perfekta lingvo mi kontaktiĝis kun ĉiuj E-representantoj el pli ol 10 landoj kaj niaj konversacioj estis glataj kaj utilaj.

Ĉu ekzistas kondiĉoj por restarigo de la Sovetrespublikara E-Unuiĝo?

En la nuna momento — ne. Tamen nun ni preperas la fundamenton, kaj eble en la proksima estonteco la sovetaj esperantistoj unuiĝos en apartan asocion.

Ĉu vi scias, kiom da organizitaj kaj neorganizitaj esperantistoj estas en via lando?

Precize mi ne scias, sed estas kelkmiloj da fervoraj esperantistoj, organizitaj en kluboj kaj rondoj. Certe ankaŭ kelkaj miloj estas la neorganizitaj.

Kie plej multe estas disvastigita kaj bone organizita la E-movado en USSR?

En la urboj Ufa, Barnaul, Leningrad, Harj-kov, en la baltaj respublikoj k. a.

Fine, kia estas via opinio pri la revuo «Scienca Mondo» — organo de la Tutmonda Federacio de Sciencaj Laboristoj, kiu ekde tiu jaro komencis aperi ankaŭ en Esperanto?

Ĝi estas grava eldonaĵo ne nur por la E-movado, sed ankaŭ por la scienco. Vi scias, ke la scienca informado senĉese kreskas kaj la sciencaj laboristoj ne havas fizikajn eblojn konatiĝi kun ĉiuj sciencaj eventoj en la mondo, ne havas fizikajn eblojn lerni ĉiujn lingvojn. Do, al tiuj, kiuj estas esperantistoj, „Scienca Mondo“ fariĝos bonega informilo por utila laboro.

Lajpcigo, novembro 1976

Verdaj steletoj

Ljudmila Jevsejeva

HEROINO RITA

Ve al vintro! — diras Rita.
Nova pelto — finkudrita.
Ve al ŝormaj neĝokantoj!
Fin'rikitaj estas gantoj.
Timi froston? Anekdoto!
Sur piedo — felta boto.
Kaj orelojn sur la kapo
varme ŝirmas fela ĉapo.

Por la tuta vin'ro Rita
estas bone ekipita.

MI NE GRIPAS

Mi ne ternas. Mi ne tusas.
Kio estas medicin' —
mi ne scias. Kaj la frosto
tute ne timigas min.

Tri regulojn, sen sekreto,
ĉiam sekvu kun impeto.

Ellitiĝo — frumatena.
Freŝa duŝ' — minutojn tri.
Ne forgesu gimnastiki:
unu — du — tri,
unu — du — tri!



KIAM LA NEĜEROJ FLUSTRAS

La knabo marŝis sur la bulvardo, kurbiĝinta pro la peza sako. Lia fratineteto rapidis per etaj paŝoj post li, kaj la neĝo knaris sub iliaj kaŭcukaj ŝuoj.

— Fraĉjo, ĉu vi aŭdas la neĝerojn? — demandis mallaŭte la knabineto.

— Nenion mi aŭdas.

— Fraĉjo, la neĝeroj flustras.

— Ili ja flustru! — La knabo haltis ĉe la angulo, mallevis la sakon kaj per la dorso de la mano forviŝis la ŝviton desur la frunto. Li ĉirkaŭrigardis la larĝan bulvardon — ĝi estis senhoma. Blueta mallumo kovris la dometojn.

— Ni iru! — diris la knabino.

— Ĉi tie mi restos. La loko estas bona. Sur tiu ĉi strato pasas laboristoj. Kaj vi kaŝos vin tie . . . — li montris la altan domon ĉe la vidalvida trotuaro.

— Bone, — respondis la knabino kun kuntirita koro kaj ekrigardis al la malluma enirejo. Ŝi timis.

La knabo lasis en la sako nur la ĵurnalojn kaj unu pakaĵon da libretoj kaj la ceterajn pakaĵojn portis en la enirejon.

— Kaŝu vin malantaŭ la pordo kaj rigardu ĉiam al mi. Kiam la libretoj finiĝos, alportu al mi pakaĵon, poste alian. . . denove. . . Se io okazus, vi scias kion fari, ĉu ne? — la knabo karesis la hararon de sia fratineteto.

— Mi scias, — diris mallaŭte la knabino.

La mateno ankoraŭ ne estis enirinta la malluman enirejon. La knabino fermis la pordon kaj suriris la rubkeston. Tra la rompita vitro de la fenestro blovis glacifrosta vento. Ŝi kaŝis sin en sia malnova palteto kaj atente observadis sian fraton. Ŝia mentono tremis pro timo.

— Ĵurnaloj! Ĵurnaloj! — kriadis la knabo ĉe la angulo.

Mateniĝis. Sur la stratoj ekrapidis homoj. La fabrikaj sirenoj komencis fajfsignali. La knabino streĉe rigardis

la preterpasantojn dirante al si: „Jen tiu ĉi estas laboristo, kaj tiu ĉi ankaŭ; ili certe aĉetos la libreton.“ En la kortofundo oni aŭdis rapidajn paŝojn, kaj la knabino malfortiĝis pro timo. Preterkuris junulo kun abundaj blondaj harbukloj, aĉetis kelkajn libretojn kaj revenis nerimarkinte la knabinon.

— La duelo finiĝis! Georgi Dimitrov venkis! — kriadis la knabo kaj enigis libretojn en la etenditajn manojn.

La knabino trakuris ofte la bulvardon kaj transdonadis al sia frato novajn pakaĵojn.

— Dimitrov estas en la kelkarcero de la Hitlera polico. Gjoring sin preparas mortigi lin sekrete! — La voĉo de la knabo raŭkiĝis pro la mordatan frosto.

En la enirejo fariĝis malpli mallume. La suno provadis ekrigardi al la tero, sed la neĝaj nuboj haltigadis ĝin, kaj sur la ĉielo apenaŭ konturiĝis pala orangkolora globo. La neĝeroj flustris plu inter si.

Antaŭ la knabo ekstaris egstatura viro, vestita en peza supervesto kaj felta ĉapelo. Li ekridetis enigme, kaj liaj maldensaj lipharetoj, pendantaj sur la mentono, tremetis de tempo al tempo. La knabo ne surpriziĝis. Li ankaŭ alifoje estis renkontiĝinta kun tiu ĉi policagento.

— Kion vi vendas? — mallaŭte demandis la viro.

— Ĵurnalojn, — respondis la knabo kun ŝajna indiferenteco.

La policano ekŝovetis en la sako, kaptis kelkajn ĵurnalojn, ĵetis ilin sur la neĝon kaj furioze tretis ilin. Li eligis la pakaĵon.

— Kaj kio estas tio ĉi?

En liaj malgrandaj okuloj brulegis malico.

— La parolado de Georgi Dimitrov antaŭ la Lajpciga Tribunalo.

— Oho!

La knabo respondis nenion. Li estis kontenta — nur unu pakaĵo iros en la

manojn de la polico, sed la ceteraj. . . La fratineto sciis, kion fari. Li rigardis la policanon rekte en la vizaĝo, sed miloj da pingloj eniĝadis en lian frostiĝintan korpon.

— Prenu tiujn ĉi libraĉojn kaj ekiru! — la agento piedfrapis la pakajon.

La knabo ĵetis la sakon sur sian ŝultron kaj ekmarŝis, eĉ unu fojon ne rigardinte al la malluma enirejo.

Longe la knabino sin premis al la muro kaj ne havis kuraĝon eĉ moviĝeti. Sur ŝiaj vangoj fluis larmoj. Ankaŭ ĉi-foje ŝia frato revenos el la

policejo bluiĝinta pro batado. Avinjo devas baki cepon kaj kovri lian korpon per ĝi. La knabino eliris timeme el la enirejo. Fore sur la bulvarado ŝi rimarkis la policagenton. Kiam la felta ĉapelo malaperis en la tumulto, la knabino kaptis unu pakajon kaj iris al la angulo, kie ŝia frato staris antaŭe.

— La parolado de Georgi Dimitrov antaŭ la Lajpciga Tribunalo! . . .

La knabino svingadis la libreton en siaj manoj, kaj ŝia voĉo flugis kiel hirundeto super la homplena bulvarado.

La neĝeroj flustris kaj kisis la frostiĝintajn infanajn lipojn.

El la bulgara: D. Haĝiev

DisTroj

Post familia kverelo la edzino [diras al sia edzo:

— Ho ve, kie estis mia kapo, kiam mi konsentis edziniĝi al vi?

— Sur mia brusto, mia kara. . .

*

Du amikoj renkontiĝas sur la strato.

— Diru ion novan ĉe vi! — ekparolas la unua.

— Ho! . . . terure. . . Mia edzino ne plu estas fidela al mi!

— Sed, kara, mi demandas vin pri io nova! . . .

*

Post longedaŭra gastado babilema virino diras al sia amikino:

— Mi jam devas iri hejmen. Mia gastado ĉe vi jam estas sufiĉa. Sed, mi petas vin, ne akompanu min ĝis la pordo.

— Ho! . . . Por mi estos granda plezuro akompani vin. . .

*

— Koljo, vi denove ricevis malbonan poenton en la lernejo. Verŝajne vi ne komprenis la demandon de via instruisto?

— Ne, paĉjo, la instruisto ne komprenis mian respondon!

*

— Kial via filo ankoraŭ ne laboras?

— Por peza laboro li estas malforta, kaj por facila — tre peza.

El la bulgara: Venelin Drumev

ENIGMO: TRALEGU FRAZON EN LA KVADRATOJ!

2	7	6	2	8	13	1	5	×	2	7	1	13	7	×	10	13	×
10	15	3	16	11	5	×	6	5	8	×	3	15	!	×			

Por tralegi la frazon, vi devas uzi jenajn ŝlosilvortojn:

1—2—3—4—5 Dometo por turistoj
6—5—7—1 Prepozicio
8—9—7—2 kaj
6—10—2—11—2—3 > Urboj en Bulgario
12—13—10—4—5—10—14—13 Sufikso

Ĉiu cifero signas saman literon.

Genadij Berezin,

Solvo de la enigmo en n-ro 7-8

1. Tendaro, 2. Arlekeno, 3. Paco,
4. Luksa, 5. Ciklo, 6. Da

Proverbo: Tro rapida akcelo ne kondukas al celo.



En la **Borba** (1976) granda datilo de Nikolai Najdenov (21. IV) artikolo «La lingva problemoj kaj la internacia lingvo». Esperanto de Marica.

En j. «Trojanski Glas» — u. Trojan (21. IV): artikolo «La lingva problemoj kaj la internacia lingvo». Esperanto de Marica.

En j. «Čepinac» — u. informo pri esperantista ĵurnala priestaro de Belgrad, gvidata de Ivan Segijev — u. Marica.

En j. «Sumenska Zvezda» — u. informo (10. VII) artikolo «Kongreso de Esperanto kaj la paco» de G. Stojan Moraresku pri la 39-a E-kongreso en Ruse.

En j. «Sentyunivska Zvezda» — u. informo (20. VII) artikolo «Kongreso de Esperanto kaj la paco» de G. Stojan Moraresku pri la 39-a E-kongreso en Ruse.

En j. «Fronth» — u. informo (24. VII) artikolo «Kongreso de Esperanto kaj la paco» de G. Stojan Moraresku pri la 39-a E-kongreso en Ruse.

En j. «Otecestven Front» — u. informo (9. VIII) artikolo «Kongreso de Esperanto kaj la paco» de G. Stojan Moraresku pri la 39-a E-kongreso en Ruse.

En la sama ĵurnalo (24. VII) informo pri la «propra korespondanto de la ĵurnalo» de Karakacano pri la Internacia Arkeologia E-Brigado «D-ro L. Zamenhof» apud Marica.

En j. «Haskovska Trihuna» — u. informo (14. VIII) artikolo «Kongreso de Esperanto kaj la paco» de G. Stojan Moraresku pri la 39-a E-kongreso en Ruse.

En la sama ĵurnalo (17. VIII) artikolo «Kongreso de Esperanto kaj la paco» de G. Stojan Moraresku pri la 39-a E-kongreso en Ruse.

En j. «Truda» — u. informo (25. VIII) artikolo «Kongreso de Esperanto kaj la paco» de G. Stojan Moraresku pri la 39-a E-kongreso en Ruse.

En j. «Avtostroitel» — u. informo (16. VIII) artikolo «Kongreso de Esperanto kaj la paco» de G. Stojan Moraresku pri la 39-a E-kongreso en Ruse.

En j. «Blagoevsko Zname» — u. informo (26. VIII) artikolo «Kongreso de Esperanto kaj la paco» de G. Stojan Moraresku pri la 39-a E-kongreso en Ruse.

En j. «Zarja na Komunizma» — u. informo (12. IX) artikolo «Kongreso de Esperanto kaj la paco» de G. Stojan Moraresku pri la 39-a E-kongreso en Ruse.

En la sama ĵurnalo (9. X): informo pri renkontiĝo de la esperantistoj de Loveĉ kun ang.

buĥin (7. IX): informo pri la akcepto de granda grupo de ĉeĥoslovakaj esperantistoj en la urbo.

En j. «Pirinsko Delo» — u. Blagoevgrad (24. IX) informo de Nikola Atanasov pri la agado de la esperantistoj en la urbo.

En j. «Iskra» — u. Kazanlak (2. X) informo pri renkontiĝo de lektoroj de Esperanto el Kazanlak, Stara Zagora kaj Gabrovo por A. interŝanĝo de pedagogia sperto. En la sama numero: informo pri malfermotaj kursoj.

En j. «Impulso» — organo de Ministerio de Komunikado kaj de CK de la Sindikato de Laborantoj en la Komunikado (Kapo Informo) mado — Sofio (5. X): artikolo de Dragusko Petrov sub titolo «Esperanto — lingvo paco kaj amikeco» pri la laboro de IPTEA en UK de Esperanto en Ateno.

En j. «Večerni Novini» — Sofio (19. X) ampleksa artikolo de Hristo Nedjalkov pri la vivo kaj verkaro de Slavco Vasev okaze de lia 70-jariĝo. Estis menciita ankaŭ la E-agado.



Gekursanoj de Esperanto en Preslavo kun sia «oldantino Rajna Stanceva (maldekstre)

Internacia grupo en la Somera E-Lernejo en Dudince. (vd. paĝon 10)



DEZIRAS KORESPONDI

Bulgario

Penka Mičeva Jakova — 5630 *Orešak*, Lovčsko (35-jara — kun sovetaĵ kaj grekaj esperantistoj).

Maria Ivanova Hristova — Partizanska 80, A, ap. 51, *Haskovo* (42-jara instruistino — kun ĉi pri ĉi).

Ĉeĥoslovakio

Viliam Hajovsky — Urbankova ul. ĉ. 2901/16, 921 01 *Piešťany* (28-jara — kun ĉi).

Hungario

Horvath Maria — H-8095 *Zalacseb*, Rakoczio. 73 (fraŭlino — kun ĉi).

Palcs Cyongyi — H-8946 *Tofej*, Rakoczi u. 58 (fraŭlino — kun ĉi).

Nemeth Miklos — H-8900 *Zalaegersieg*, Pozva u. 59 (fraŭlo — kun ĉi).

Hervath Tamas — H-8954 *Ortanaza*, Kossuth u. 37 (s-ro kaj s-ino — kun ĉi).

Dankos Tibor — H-8896 *Pusztamagyarod*, Ady u. 18 (fraŭlo — kun ĉi).

Laczi Endre — H-8783 *Tilay*, Kossuth u. 14 (fraŭlo — kun ĉi).

Nemes Terez — H-8900 *Zalaegersieg*, Pozva u. 40 (fraŭlino — kun ĉi).

Sebök Aniko — Karcag Ady Endre ut. 2 (lernantino en la VIII klaso — kun bulgaraj lernantinoj de la VIII klaso).

Italio

Norma Saccardo Pejčirova — Via Carducci 4, 35010 *Villefranca*, Pačova (s-ino — kun ĉi).

Peruo

Luisa Cernejo — Elias Aguirre 585, *Belavista Callao* 2 (21-jara fraŭlino).

Iris Cespedes — Maypu 390 *Pueblo Libre* Lima — 21 (20-jara fraŭlino).

Lydia de Arce — Rivačeneyra 950 urb. *S-ta Catalina Victoria* (35-jara s-ino).

Luis Dufco — Ricardo Flores 368/6 urb. *S-ta Catalina Victoria* (16-jara fraŭlo).

Juan Villaizan — Huamachuco 1046 *Jusus Maria Limaii* (15-jara fraŭlo).

Pollando

Anna Grosicka — ul. Piastow 3/12, 86—050 *Solec Kuj* (18-jara lernantino — kun ĉi pri sporto, muziko, turismo).

Hanus Wieslaw — Giuchow 41, 31—100 *Lancut* (18-jara — kun gebulgaroj: muziko, filmoj, foto).

Krystyna Milanowska — 85—319 *Bydgoszcz*, ul. Pawla Findera 12/36 (24-jara fraŭlino — muziko, bk, pm, junularo).

Aleksander Niziotek — ul. Boha'erow Warszawskich 1-a, 41—800 *Zabrze*, Techn. Przem.

Gazow (kun bulgarinoj — literaturo, muziko).

Rumanio

Ekslibrisojn el la tuta mondo, precipe el Bulgario, interŝanĝas kaj kolektas por internacia ekspozicio, rekompencas per pm (aŭ laŭdezire): Jenö Zagoni, Casuta Postala 10, R-4000, *Sfintu Gheorghe*.

Sovetunio

Emanuelis Mikitavičius — *Jonišklis Gustoniai*, Litovio (kun ĉi — pri ĉi, precipe sporto, bk, pm, insignoj, gram. diskoj, revuoj).

Tiit Heidmetis — *Tartu*, Pälsoni 1v—104, Estonio (19-jara studento — kun ĉi pri ĉi).

Gonca Ludmila — 277 018 *Kišinev*, Munčești, 426-b, kv. 13-a (22-jara fraŭlino — kun ĉi).

Velikanova Ludmila — 277 018 *Kišinev*, 426-b, kv. 2 (21-jara fraŭlino kun ĉi pri ĉi).

Zajčenko Tamara — 277 043 *Kišinev* 43, ul. Hristo Botev 3/2, kv. 51 (22-jara fraŭlino — kun ĉi pri ĉi).

Luža Adomas — *Kretioga*, Pajurio 31, 235 700 Litovio (studento — kun ĉi pri ĉi, pm).

Solovjov Konstantin — u. Jakuba Kolasa 9 kv. 27, *Minsk* 13 (23-jara — pri moderna muziko, insignoj, sporto, foto k. a.).

Ivan Kulakov — 394 028 *Voroneŝ* 28, Irkutskaja 21, kv. 28 (instruisto de germana lingvo — kun ĉi).

Irina Stepanova — ul. Maĵajskiego 6-8 660 041, *Krasnojarsk* — 41, Siberio (20-jara studentino — kun ĉi pri ĉi).

Voronina Tatjana — str. Tereškova dom. 7, kv. 45, 290022 *Lvov* (17-jara lernantino — muziko, junularaj problemoj ka.).

Gedlovaite Silvija — J. Johano, 17, 235250 *Patvalys*.

Odincov Dima — str. Litkensa 7, kv. 6, *Jalta*, Krim (17-jara — alumetskatoloj).

Vytautas Martišius — 8-te m-la 235250 *Pasvalys* (14-jara lernanto).

Igor Nikolaev — *Omsk* 644042, Prospekt Marksa 37, kv. 69 (18-jara studento de historio).

Kersti Kalme — 203504 *Jarvakandi*, M. Gerki post 29, Estonio (29-jara sinjorino — kun ĉi pri ĉi, pm, bk, globkrajonoj, diskoj ka.).

Je la 27. X. de oktobro forpasis en Veliko Târnovo

Penka Popova (1904—1976)

veteranino kaj senlaca semantino de Esperanto.

Tragike forpasis en Petrič nia sindona E-aktivulo

Borislav Vâlev

Niajn kondolencojn!

